

Letero de Konsilanto

Saluton !

Vidinte ĉi-supran titolon kaj ĉi-apudan foton, vi probable vin demandas: kial do tiu, ne la kluba Prezidanto;



kaj kial li sin nomas "Konsilanto"? Nu, mi provu tion tuj klarigi!

Aktuala tutmonda epidemio, kaj leĝoj kiuj celas bridi ties danĝeron, malebligas kunveni ĉe Diorama, kaj devigas oficulojn de LEK prizorgi prioritare siajn familion kaj profesion. Tial Bultenon majan-junian oni dissendis plejparte per interreto, tial julian-aŭgustan kaj septembran-oktobran oni ĉi-jare ne ricevis. Proprainiciate mi do preparis kaj eldonas "anstataŭan Bultenon" por oktobro, kaj eble simile faros por monato(j) estonta(j). Bonvolu do legi ĝian magran enhavon, kaj pardoni ĝiajn multajn mankojn! Elektita oficulo de LEK, kiu ne havas specialan rolon, membras en tiel-nomata Konsilantaro, kaj logike nomiĝas Konsilanto, kvankam malofte oni petas de ŝi/li konsilon. Ĝis jaro 1926 oni nomis la gvidantaron de LEK "komitato", post tiam "konsilantaro". Kial tiel ? Pri tio mi bedaŭrinde nenion scias.

Ĝis renormaliĝo!

Terry Page

anstataŭa

BULTENONO

*Londona Esperanto-Klubo
oktobro 2020*

2

TRANS-NORDMARA KUNLABORO INTER LONDONA KAJ ANTVERPENA ESPERANTO-KLUBOJ !

LEK-Sekretario Renato negocis en la nomo de nia klubo interkonsenton kun Esperanto-grupo en Antverpeno. Per tio la du kluboj respondecas pri alternaj Zoom- prezentoj, kiujn ĉeestas membroj de ambaŭ, kun pluraj gastoj en aliaj urboj kaj landoj. Tial prezenton ofte ĝuas publiko 40- ĝis 60-persona.

3

OKAZINTAĴOJ ĜISNUNAJ - titoloj kaj prezentintoj :
KAJ - kia aĉa jaro - Giom' kaj Melono ; *Lingva Seminario* - Prof. John Wells ; *Revuo Monato* - Paul Peeraerts ; *Unu-, du-, tri-lingvulo* - Orlando Raola ; *Vizito al Kenwood House* - Anna Lowenstein ; *Ĉu Tero plata ?* - Bruce Sherwood kaj Derek Roff ; *Ĉu Paŭlismo aŭ Kristanismo ?* - Trevor Steele ; *Lernejoj en Barato* - Giridhar Rao ; *Elektraj bicikloj* - Eddy Van den Bosch ; *Radio Bielsko* - Georgo Handzlik ; *Mia verda vivo* - Murat Özdizar



OKAZONTAĴOJ ĈI-MONATAJ (T.E. OKTOBRAJ)

Kvin vendredoj - kvin oportunoj por vin informi, eduki, distri. For pesimismen! - Ahmad konvinkos nin, ke ni ja bonas, kaj povas. Ek- (aŭ plu-) konatiĝu kun Spinozo kaj lia ismo - Ivo prezentos al ni. De la junularo dependas estonta sukceso de Esperanto - Charlotte bone scias pri ili kaj povas nin informi. Sceptikuloj pri kuraca valoro de plantoj aŭskultu al Lode kaj rekonsideru! Kaj se tioma preleg-regalo igos vin dispepsia, abstinu monat-fine kaj anstataŭe ĝuu programon de internacia muziko kiun, kvazaŭ ĉirkaŭ lignofajro, reĝisoros Klaas.

(Precizajn datojn kaj kromajn detalojn bonvolu trovi sur paĝo 4)

KIEL PARTOPRENI EN « ZOOM »-KUNVENOJ, KAJ/AŬ SPEKTI REGISTRITAJN PREZENTOJN ?

Informojn ĉi-sekvajn devus jam ricevi ĉiu, kies ĉi-jara LEK-aligilo surhavas aktualan retpoŝt-adreson. Aliuloj eventuale sin turnu al amiko/familiano, kiu tion posedas, kaj petu de lek.sekretario@gmail.com ligilon al proksim-vendreda « ZOOM »-renkontiĝo, kaj/aŭ al registraĵo (ĉe YouTube) de prezento jam okazinta.

oktobro

- 02 *Ni bonas kaj ni povas:* prelegos **Ahmad Mamdoohi**,
ĉefdelegito de UEA en Irano
- 09 *Baruch Spinoza:* prelegos **Ivo Durwael**, UEA-Fakdelegito
pri instruado
- 16 *La junulara Esperanto-Movado:* **Charlotte Scherping**,
prezidantino de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
- 23 *Kuracado per plantoj:* prelegos **Lode Van de Velde**
- 30 *Ĉe Lumo de Lignofajro:* internacian muzikan programon
gvidos **Klaas Dijkstra**
-

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere. Dum la Kronviroza krizo, kunvenoj okazas per la reta sistemo Zoom, komenciĝante je 19h (UTC+1). Kunvenoj ĉe Old Diorama Arts Centre neniel povas plu okazi ĉi-jare, sed eble (!) rekomenciĝos en januaro 2021.

Funkciuloj Pro nevolonta kaj bedaŭrata prokrasto de ĉi-marta Jarkunsido, Londona Esperanto-Klubo aktuale ne havas (almenaŭ teorie) ajnajn oficulojn. Eksaj funkciuloj tamen klopodas konservi la klubon en stato viva ĝis tiam, kiam eblos okazigi laŭregulajn elektojn. Temas pri -

Honora Prezidanto: Prof. John Wells;

Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.

Konsilantaro: Chris Lewis (Prezidanto), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Renato Corsetti (Sekretario kaj Programo), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Antony Rawlinson (Bultenisto), Roland England, Anthony Bodineau, Terry Page.